


# CERBE kaj KORE



**KULTURA SUPLEMENTO  
AL LA REVUO "PONTO" N-RO 138**

***N-RO 36 (104), JANUARO 2024***

# Enhavo

## **Tradukita prozo**

- Andrej Usačov*. Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj por infanoj kaj  
adoltoj. Trad. *S. Paĥomov (daŭrigo kaj fino)* 3
- Fjodor Sologub. La ĉarma paĝio. Trad. G. Ŝlepĉenko 16

## **Originala prozo**

- Tatjana Auderskaja*. Mortigo de Mnemozino 11
- La Fina Venko 11

## **Tradukita poezio**

- Nikolaj Rubcov*. Vintra kanto. Trad. *K. Ilutoviĉ* 12
- Osip Mandelŝtam*. Novaj tradukoj de *L. Novikova kaj M. Bronŝtejn* 14

## **Literaturo**

- Valentin Melnikov* Du sonetaroj – nia unika trezoro 23

# UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOMAJ RAJTOJ



*Tradukita prozo*

## Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj por infanoj kaj adultoj

*Andrej Usačov<sup>1</sup>*



*Rerakontis en Esperanto Sergio  
Paĥomov, Kirov*

*Daŭrigo kaj fino. Komenco en CkK n-ro 35 (103)*

### **Rakonto 7**

La Eta Homo havis en vilaĝo avinon, kiun li tre amis kaj skribis al ŝi ĉiusemajne leterojn. Li skribis longajn leterojn. En iuj el ili estis eĉ preskaŭ dudek vortoj.

– Kara avinjo! – skribis La Eta Homo.– Kiel Vi fartas? Mi fartas bone. Mi sendas al Vi la semojn de ungetoj. Plantu ilin kune kun terpomo ĉar la ungetoj estas la plej bona rimedo kontraŭ la kolorada skarabo. Via amata nepo.

– Kara nepo! – respondis la avino el vilaĝo.– Mi ricevis vian leteron. Koran dankon. Mi fartas bone. Domaĝe estas ke viaj ungetoj dum vojo elŝutiĝis. Laŭ via malkoncentriĝo vi denove forgesis glui la koverton. Malgraŭ ĉio mi dankas vin pro via zorgemo kaj atentemo. Via amata avino. Ricevinte la leteron Eta Homo tre koleriĝis. Li memoris firme ke li akurate gluis la koverton. Li ĉiam bone gluis kovertojn. Sed la kovertoj ĉiam atingis la adresaton malfermitaj. “La poŝtistoj kulpas.”– finfine konkludis li.

La poŝtistoj en la granda urbo estis tro scivolemaj. Krome, laŭ la ordono de Estro de Polico ili devis LEGI ĈIUJN SUSPEKTINDAJN LETEROJN KAJ OBSERVI ĈIUJN SUSPEKTINDAJN PERSONOJN. Sed ĉar neniu povus scii kiu

---

<sup>1</sup> Andrej Usačov (nask. en 1958) estas populara rusa porinfana poeto kaj prozisto.

do letero estas SUSPEKTINDA kaj kiu NE SUSPEKTINDA, ili legis ĈION, ĉu suspektindaj ĉu ne, kaj observis ĈIUJN suspektindajn personojn.

La Eta Homo estis TRE SUSPEKTINDA PERSONO. Do la poŝtistoj ofte observis lin tra truoj en barilo aŭ tra fendo en poŝtkesto. Unu poŝtisto eĉ tre profunde ŝovis sian nazon en la fendon kaj ne povis liberigi sian nazon el la fendo sen helpo de la Eta Homo.

Do la Eta Homo decidis doni al ili bonan lecionon. Li aĉetis grandan koverton, saltis en la koverton, gluis sin de interne. Averte li petis poŝtiston preni la koverton el lia hejmo kaj porti al la poŝto. Poŝtistoj vidinte LA SUSPEKTINDAN GRANDEGAN KOVERTON tre ĝojis.

– Nun ni legu,– ili ridis– kion do skribis ĉi tiu suspektinda la Eta Homo al sia suspektinda avino.

Kiam ili nur komencis malfermi la kovertegon, tuj el ĝi aŭdiĝis kolera voĉo:

– **NENIU RAJTAS ENMIKSIĜI PRIVATAN VIVON DE ALIAJ HOMOJ, ENIRI FREMDAN DOMON SEN PERMESO KAJ LEGI FREMDAJN LETEROJN!**

La poŝtistoj estis tiom ŝokitaj, ke tuj gluis sur la kovertegon aerpoŝtan markon kaj forsendis ĝin per la unua aviadilo.

Sekvontage la Eta Homo alvenis al sia avinjo. Li helpis planti la ungetojn kaj sammaniere revenis hejmen. Tiel neniu eksciis kion do skribis la Eta Homo al sia avinjo.

## **Rakonto 8**

Foje la Eta Homo ricevis inviton al Internacia konferenco de florkulturistoj alilande.

Li rapide metis ĉion necesan en sian valizon kaj petis najbarojn zorgi pri floroj, hundeto kaj foriris. Tamen en la ŝtatlimo lin haltigis la limgardistoj.

– Ni ne povas vin ellasi en fremdan landon, – diris ili – ĉar vi ne havas specialan permeson.

– Kiun permeson? – miris la Eta Homo – Birdoj ĉiujare forflugas alilanden. Kaj neniun specialan permeson ili bezonas.

– La birdoj estas estaĵoj malsaĝaj,– oni respondis al li – Sed por homoj ekzistas APARTAJ REGULOJ!

– Sekve,– denove miris la Eta Homo, – la malsaĝaj estaĵoj povas flugi eksterlanden sed la saĝaj ne povas? Mi opinias ke la reguloj estas malsaĝaj...

– Nenion ni scias, – respondis la limgardistoj – pri apartaj reguloj kaj specialaj permesoj respondecas Speciala Ministro.

La Eta Homo ekspiris kaj ekiris al la Speciala Ministro. Tamen la Ministron deziris viziti multaj homoj kaj do ĉiuj atendis sian vicon. La vico estis por du semajnoj. Eble eĉ por du jaroj...

– Tiamaniere la Internacia konferenco finiĝos, – koleriĝis la Eta Homo kaj ne atendante inviton li mem nerimarkeble eniris kabineton kie sidis la Ministro.

La Ministro sidis ĉe tablo, subskribis iujn dokumentojn kaj atentis iun ajn. Tiam la Eta Homo ne povis plu atendi, li suprengrimpis en fotelon, poste sur la tablon (certe li antaŭe purigis siajn ŝuojn ĉar li estis EDUKITA Eta Homo) kaj ekstaris sur gravajn ŝtatajn paperojn, kiujn subskribis la Ministro.

– Kio ĉi tio okazas? – miris li. – Kio vi estas?

– Mi bezonas veturi alilanden, – diris la Eta Homo. – Sed oni min ne ellasas...

– Kaj vere oni faras! Se ĉiujn ellasi alilanden, kiu do restas ĉi tie? – severe diris la Speciala Ministro. – Se al vi ne plaĉas NIAJ REGULOJ, ni povas forpreni de vi NIAN CIVITANECON.

– Tamen en la Deklaracio de Homrajtoj estas dirite, – insistis la Eta Homo. – Ĉiu rajtas...

– En miaj ŝtataj paperoj la vortoj ne estas, – malkontente prononis la Ministro. – Do mi petas lasu min labori!

– Ne estas?! – kriis la Eta Homo. – Do estu!

La Eta Homo kaptis skribilon de la Ministro kaj skribis en surtablaj gravaj ŝtataj paperoj: **ĈIU HOMO RAJTAS FORVETURI EL SIA LANDO KAJ VENI REEN! ĈIU HOMO RAJTAS ESTI CIVITANO DE SIA LANDO. NENIU POVAS ESTI SENIGITA DE SIA CIVITANECO AŬ DE RAJTO ŜANĜI SIAN CIVITANECON!** Neniu iam ajn kuraĝis konduki tiamaniere en la kabineto. La Speciala Ministro piedbatis plankon kaj mane frapis tablon. Sed la Eta Homo ne ektimis, male li ŝovis sub manegon de la Ministro specialan sigelilon por ke la Ministro **ne frapu per sia manego senutile**. Kiam la Ministro tiel sigelis la lastan paperon, la Eta Homo diris “Dankon!” (ja li estis tre ĝentila eta homo), malsuprengrimpis de la tablo, svingis al la Ministro kaj rapide foriris.

– Ekmemoru, tio koncernas **ĈIUJN**, – diris li enmanigante al limgardistoj paperon kie estis sigelo kaj subskribo de Speciala Ministro: **ĈIU HOMO RAJTAS FORVETURI EL SIA LANDO KAJ REVENI!** La Eta Homo perdis multe da tempo do decidis flugi eksterlanden pere de aerbalonoj. Li aĉetis multege da ili, alligis sin kaj sian valizon firme kaj pere de laŭvoja vento atingis la Internacian konferencon. Verŝajne flugi pere de aviadilo estus pli oportune. Sed, unue la bileto tro multekostas, due, la Eta Homo deziris ke multege da homoj eksciu, ke ĉiu homo povas vojaĝi libere...

Certe ne ĉiu homo vidis alte en ĉielo etan homon, sed bone legeblis la surskriboj sur la aerbalonoj:

**ĈIU HOMO RAJTAS FORLASI SIAN LANDON!**  
**ĈIU HOMO RAJTAS REVENI SIAN LANDON!**  
**ĈIU HOMO RAJTAS...**

## Rakonto 9

Fabrikoj en granda urbo preskaŭ ne produktis vestaĵojn de etaj dimensioj. Kaj la Eta Homo konstante bezonis rekudri por si el grandaj ĉemizoj kaj pantolonoj, kravatoj kaj naztukoĵoj la malgrandajn. Eĉ meblon li ofte devis produkti por si mem. Kaj la samon pri mil aliaj bagatelaĵoj.

Jen unufoje la Eta Homo decidis organizi Union por Defendo de Intereso de Etaj Homoj. Kaj li pri tio anoncis en ĵurnalo. Sekvatage lin vizitis negranda homo en grandampla vestaĵo.

– Mi dezirus aniĝi en via Unio, – mallaŭte diris li. – Nur avertu min, ĉu ĉi tio sendanĝeras?

– Ne maltrankviliĝu, – respondis al li la Eta Homo. – En la Deklaracio de Homrajtoj diritas:

### **ĈIUJ HOMOJ RAJTAS KUNVENI KAJ ORGANIZI GRUPOJN KAJ UNIOJN!**

Sed la gaston la vortoj ial timigis forte:

– Sed se mi ne ekdeziras aniĝi al via Unio, ĉu mi ne estos persekutata?

– **NENIU POVAS DEVIGI HOMON ANIĜI IUN AJN UNION SE LA HOMO MEM ĈI TION NE DEZIRAS.** – trankviligis lin la Eta Homo.


– Tiam mi pli bone atendas iom, – kontente diris la vizitanto kaj foriris.

Tuj post li eniris ankoraŭ unu deziranto aniĝi al la Unio.

– Por kio vi tion bezonas? Ja vi estas grandulo! – miris la eta Homo.

– Sed mi havas malgrandajn infanojn, – respondis tiu. Poste venis aliaj urbanoj kiuj havis malgrandajn geinfanojn, ankaŭ urbanoj kiuj havis malgrandajn genevojn, genepojn. Do post iom da tempo al Unio por Defendo de Intereso de Etaj Homoj aliĝis la tuta urbo. En unua ripoztago la membroj de la Unio organizis Komunan Nudpiedan manifestacion. Nudpiedaj plenaĝuloj portis nudpiedajn infanojn, kaj nudpiedaj infanoj portis grandajn aŝiojn:

#### **Kiu defendu interesojn de etaj homoj de urbo?**



Vespere sur centra placo estis aranĝita sporta festo. Urbaj infanoj konkuris pri lerteco: kiom, ekzemple, da infanoj sukcesos vestiĝi en unu kostumon de paĉjo aŭ kiu el etaj lernejoj pli rapide kuros 100 metrojn uzante grandan piedveston?

– Ĉi tio estas indigniga! – diris de sur balkono Urbestro. Nian urbon vizitas eksterlandanoj. Kion ili opinios, ekvidonte nudpiedajn geinfanojn sur stratoj de nia granda urbo? La saman vesperon li ordonis al ĉiuj piedvestaj fabrikoj produkti ĉion necesan por infanoj kaj etaj homoj.

Sed la eta Homo ne trankviliĝis. Post iom da tempo li fondis Partion de Verduloj.

– Klarigu, – demandis lin la urbanoj. Ĉu en la Partion povos aniĝi nur la VERDAJ?

– Kaj verdaj, kaj flavaj, kaj blankaj, kaj nigraj. La haŭtkoloro ĉi tie ne gravas, – eksplikis la eta homo. En la tuta mondo oni nomas Verduloj tiujn, kiuj batalas por ekologio. En nia urbo estas multege da uzinoj kiuj malpurigas, venenigas riveron kaj aeron.

– Rigardu, – montris li al la urbanoj. Folioj en nia urbo flaviĝas je unu monato pli frue. Ĝardenistoj plantas novajn arbojn. Sed fabrikoj aperas pli rapide ol arboj. Do baldaŭ ni ne povos spiri. Tial esti Verdulo signifas batali por ke ĉiu spiru puran aeron!

Baldaŭ multaj urbanoj decidis iĝi verduloj. Verdulaj sciencistoj projektis specialan purigan instalaĵon. Verdulaj ĵurnaloj postulis fermi la plej malutilajn, danĝerajn uzinojn kaj publikigis portretojn de plej MALUTILAJ direktoroj. Verduloj-lernejanoj klopodis ŝtopi la plej malutilajn tubojn kaj lernejaninoj proteste farbis siajn horarojn verdkoloro.

Tiam la Urbestro decidis fermi Partion de Verduloj. Ne tial ke li ne ŝatis spiri puran aeron sed tial ke fermi unu Partion de Verduloj estas pli simple ol fermi MULTAJN MALUTILAJN UZINOJN. Matene li diris pri tio al sia familio kaj subite eksciis ke ankaŭ liaj infanoj estas VERDULOJ kaj genepoj estas VERDULOJ, eĉ lia edzino al ili simpatias.

– Se vi fermos la Partion de Verduloj, minacis ili ĉiuj, ni fondos Union por batali kontraŭ Urbestro! Post tio ili pentris plakaton:

### **ĈIUJ HOMOJ RAJTAS ORGANIZI UNIOJN!**

Nu, vu komprenas ke eta Homo havis al ĉi tiu neniun rilaton.

## **Rakonto 10.**

Foje la Eta Homo aĉetis por si novan ĉapelon en vendejo. La ĉapelo estis tiom granda ke la Eta Homo povus kaŝi sin en ĝi. Tamen li esperis ke post lavadoj la ĉapelo malgrandiĝos.

Tago estis varmega. La eta Homo sidiĝis en ombro sub sia ĉapelo por ripozi, apud sia domo.

Ĉi momente preteriris Helpisto de Urbestro. – Ho, estas tute nova ĉapelo, meditis li kaj vidante ke lin neniu observas, la Helpisto prenis kaj metis la ĉapelon sur sian kapon. La Eta Homo komence teruriĝis sed poste komprenis la aferon. Li povus tuj frapeti ies kapon kaj postuli revenigon hejmen, sed li ja estis edukita homo, sekve ne povis frapeti kapon de nekonata Homo. La Helpisto de Urbestro, interalie, iris al mitingo, kiun organizis Grandaj homoj de la urbo. Kune kun Urbestro kaj aliaj helpistoj li suprengrimpis tribunon.

– Karaj samlandanoj, – komencis Urbestro – lastatempe en nia urbo okazas diversaj malordoj, pri kiuj kulpas iu Eta Homo. Pro li ni ne sukcesis ĝustatempe ekfunkciigi Novan Rapidecan Tramon. Pro li estas haltigitaj kelkaj Grandaj Fabrikoj. Ĉi tiu Eta Homo konstante parolas pri siaj rajtoj. Hodiaŭ li postulas liberon por paroli ĉion kion li ekdeziras. Morgaŭ li ekdeziras promenadi nuda en stratoj kaj pruvos ke li estas eta kaj por li ĉio permesitas. Nun vi imagu kio okazos, se ĉiuj komencos postuli plenumadon de siaj rajtoj kaj liberoj?!

– Ĉi tiuj Etaj homoj, – subtenis Helpisto de Urbestro – baldaŭ sidiĝos sur niaj kapoj. Jes, sur niajn kapojn! Ili konstruas siajn domojn sur niaj tegmentoj kaj

ĵetos malpuraĵon en siajn fenestrojn. Ja ili asertas ke ĉiu rajtas vivi tie kie oni deziras. Ili jam organizis sian UNION de Etaj Homoj, kiu postulas ke ĉiuj fabrikoj kudru por ili vestaĵojn. Se tio daŭros, baldaŭ ĉiuj normalaj homoj restos senvestaj...

Subite io frapis kapon de Helpisto de Urbestro. Tio tre mirigis lin, ĉar malofte lin io frapis sur kapon. La Eta Homo ne povis plu aŭskulti la absurdaĵon kaj piedbatis lin kapen. Mirigita Helpisto de Urbestro forprenis ĉapelon kaj ĉiuj ekvidis: sur lia kapo sidis, pli ĝuste, staris ETA VERDA HOMO!

– Mi petas pardonon, – ĝentile diris li – Mi neniam ĉi tie estus, se la estimata raportanto ne surkapigis min kune kun mia ĉapelo... Sekve se iu nun estas senvestita, do estas mi!

De maltrankviliĝo kalva kapo de Helpisto ŝvitiĝis kaj iĝis glita. La Eta Homo malfacile staris sur la kapo, sed li daŭrigis:

– Mi tute ne deziras konstrui mian domon sur fremda tegmento aŭ kuri nuda en stratoj. Ĉar en la Deklaracio diritas:

**ĈIU HOMO HAVAS NE NUR RAJTOJN SED ANKAŬ DEVOJN POR LA SOCIO, EN KIU LA HOMO LOĜAS ! KAJ ĈIU HOMO KONDOTU TIEL KE LIAJ AŬ ŜIAJ RAJTOJ KAJ LIBEROJ NE MALHELPU AL RAJTOJ KAJ LIBEROJ DE ALIAJ HOMOJ!**

Kaj se mi hazarde sidiĝis sur via kapo, – turnis li sin al la Helpisto, – Do vi rajtas postuli ke mi forlasu ĝin. Ĉar ankaŭ Grandaj homoj havas samajn rajtojn kiel la Etaj homoj. Sekve neniu rajtas sidiĝi sur vian kapon!

La parolado de la Eta Homo plaĉis al aŭskultantoj tiel ke ili longdaŭre aplaŭdis kaj ripetis:

– Ĉu vi aŭdis kiel bone li diris? NENIU rajtas SIDIĜI SUR NIAN KAPON.

## **Rakonto 11.**

En la urbo okazu elektado de nova Urbestro. La urbanoj pensadis, meditadis, konsiliĝis kaj decidis ke pli bonan Urbestron ol la Eta Homo ili ne trovos.

– Niaj estroj havas grandajn “apetitojn”. Ili deziras multe da mono, pompajn domojn, luksajn vilaojn. Sed la Eta Homo estas modesta. Domon li bezonas etan, ankaŭ aŭton etan... Kaj neniu povos pli bone ol li defendi niajn rajtojn!

Sed la Eta Homo eksciinte pri tio, rifuzis.

– Dankon al vi por via fido! – diris li, – Sed mi opinias ke ĉiu okupiĝu pri sia afero kaj plenumu sian laboron kiun li ŝatas. Mi ne scias ĉu povos mi iĝi bona Urbestro, sed mi scias ke antaŭa Urbestro neniam kreskigos tiajn florojn kiel mi.

La urbanoj estis ĉagrenitaj de la rifuzo kaj ne sciis kion fari. La Eta Homo diris al ili:

– Strangaj homoj vi estas. En la Deklaracio de Homrajtoj diritas: **POTENCO EN ŜTATO DEPENDAS DE VOLO DE POPOLO. ĈIU HOMO RAJTAS ELEKTI KAJ ESTI ELEKTITA!** Tio estas ke ĉiu el vi povas iĝi Urbestro, eĉ Prezidento se vi ekdeziros.

– En nia granda urbo, – aldonis li, – estas sufiĉe da decaj homoj, ekzemple nia Juĝisto. Li estas tre saĝa juĝisto, honesta homo kaj sukcesos eldoni justajn leĝojn.

La urbanoj pridisputis kaj konsiliĝis. Alvenis Tagoj de Elektado. Por iĝi Urbestro estis proponitaj du kandidatoj: Malnova Urbestro kaj Juĝisto. Ĉiu aĝa urbano ĵetu paperon kun elektita familinomo de KANDIDATO en Specialan Baloturnon. Sed antaŭ elektado la Malnova Urbestro anoncis ke Specialaj Baloturnoj difektiĝis. Tial ĉiuj VOĈDONU tiel kiel oni faris en malnova tempo kiam specialaj baloturnoj forestis.

VOĈDONI signifas DONI VOĈON aŭ KRUI. Urbestro estos tiu, por kiu plej laŭte krios la urbanoj. La anonco de la Malnova Urbestro estis stranga kaj suspektinda, sed la urbanoj decidis:

– Nu, bone. Ni multas kaj ni kriegos pli laŭte ol iuj ajn!

Dum sekvaj du tagoj ili ne manĝis glaciaĵon kaj ne trinkis eĉ malvarman bieron por ne malvarmumi sian gorĝon. – Nun ĈIU VOĈO estas valorega, – diris ili.

Fine, sur centra placo kunvenis ĉiuj urbanoj: unuflanke adeptoj de Juĝisto, aliflanke adeptoj de Malnova Urbestro. Subtenantoj de Malnova Urbestro estis tre malmultaj. Estis evidente ke malnecesas krei. Tamen Voĉdonado estas ja Voĉdonado. Unuaj VOĈDONIS adeptoj de Juĝisto. Ili kriegis tiel forte, ke de arboj ekflugis ne nur birdoj, sed ankaŭ folioj.

– Ĉi tio estas nia VOĈDONADO, – ridis ili, – el tiu flanko eblas nur krieto aŭ pepo.

Sed Malnova Urbestro estis ruza, li prenis plilaŭtigan megafonon de Estro de Polico. Li ja sciis ke helpe de la megafono li kriegos pli laŭte ol la tuta urba amaso. Li proksimigis la laŭtparolilon al sia buŝo kaj kriis. Sed anstataŭ KRIEGO aŭdiĝis nur strangaj sonoj: tpr-r-ru...

– Kio okazis? – miris la Malnova Urbestro. Subite li ekvidis, ke en sontubo de la megafono sidas la Eta Homo!

– Kia senpardoneco! Tio kontraŭleĝas! – diris la Malnova Urbestro.

– Efektive, tio estas kontraŭleĝa! – respondis la Eta Homo kaj eliris el sontubo. Kiam unuj voĉdonas helpe de siaj voĉoj, aliaj voĉdonas helpe de megafono! La Eta Homo prenis la megafonon kaj diris: En Deklaracio skribitas ke BALOTOJ KAJ ELEKTADOJ ESTU KOMUNAJ, LIBERAJ KAJ EGALAJ!

## **Rakonto 12**

La Eta Homo ekamis unu virinon. Ankaŭ la virino ekamis la Etan Homon. Ĉiutage li donacis al ŝi bukedojn de la Plej Belaj Floroj. Kaj ŝi skribis al li la Plej Tenerajn Leterojn. Baldaŭ ilia amo iĝis tia granda ke ili decidis geedziĝi. Sed tuj aperis Parencoj de la Virino. Ili longe rigardis la Etan Homon, lian etan domon, lian etan ĝardenon, eĉ lian etan hundon.

– Inter nia paren caro neniam estis VERDKOLORAJ! – deklaris, fine, unu el ili.

– Ĉu vi hazarde ne estas pigmeo aŭ liliputo? – demandis la alia. Kaj la tria anoncis:

– Ni ne povas permesi al nia paren cino edziniĝi al vi ĉar...

- Ĉar vi, fakte, nenion povas, – interrompis la Eta Homo. Li malfermis pordon kaj ĝentile petis ilin ĉiujn foriri. Por adiaŭo li diris:

– KIAM VIRO KAJ VIRINO ATINGAS PLENAĜON, ILI RAJTAS GEEDZIĜI KAJ KREI SIAN FAMILION. NEK HAŬTKOLORO, NEK NACIECO, NEK RELIGIO POVAS MALHELPI AL ILI PRI ĈI TIO.. SED ILI POVOS GEEDZIĜI NUR TIAM KIAM EKDEZIROŜ ĈI TION AMBAŬ!

La Eta Homo ekrigardis la Virinon. – Ĉu vi deziras?

– Certe jes! – respondis ŝi kaj kisis lin. Kaj estis bela geedziĝa ceremonio.

– Vi tiel bele parolis, ke mi venos kun vi al rando de la Tero, admire diris ŝi.

– Ne mi, en Deklaracio tiel skribite estas, – modeste kontraŭis li.

– Ne, mia kara, – karese diris la Virino, – Tio estis skribite en via koro!

Kaj Eta Homo konsentis.

### **Rakonto 13.**

La Eta Homo plantis en sia ĝardeno florojn, rakontis al homoj pro iliaj rajtoj kaj li akiris multajn amikojn.

– Dankon, – diris ili al li, – Vi faras TRE GRANDAN AFERON!

– ĈU? – konfuziĝis la Eta Homo, – Nur de tio ke homoj ekscias pri siaj rajtoj, malmulto ŝanĝiĝas. Gravus ne scii pri ili sed batali por ili. Nia lando estas tiom granda ke mi unu ne sukcesos rakonti al ĉiuj. Krome mi revas vojaĝi alilanden kie homoj analfabetas kaj ne povas eĉ legi ke ĈIU HOMO RAJTAS FREKVENTI LERNEJON KAJ LERNI SENPAGE! Kaj estas tiaj lokoj kie unuj homoj ekspluatas aliajn. Tamen en Deklaracio de Homaj Rajtoj skribitas:

– NENIU POVAS IĜI SKLAVO DE ALIU! En nia Tero, bedaŭrinde, estas ankoraŭ multaj maljustaĵoj.

Unufoje la Eta Homo malaperis el la urbo. Kaj neniu lin plu vidis. Povas esti ke li vojaĝas en sia lando. Aŭ kune kun sia edzino, hundeto forveturis aliajn landojn kie estas maljustaĵoj.

Sed povas esti ke li simple iĝis granda homo... Kial ne? Ja neniu scias kial etaj homoj estas etaj?

Eble tial ke ili loĝas en etaj domoj kaj tie ne eblas kreski. Povas esti ke homoj kiuj scias siajn rajtojn, eksentas sin pli liberaj, pli certaj en la vivo. Kaj etaj homoj malrapide iĝas Grandaj. Oni diros al mi ke tio NE EBLAS. Mi opinias ALIE. Ja diris la Eta Homo ke ĉiu povas havi propran opinion. Sed ĉu TIEL aŭ ALIE ie en granda lando, en granda urbo estas eta forlasita domo kun ĝardeno plena je herbo. Se vi hazarde vizitos la urbon, trovu la etan domon kaj ĝardenon kaj forigu herbaĉon, lolojn, vi tuj ekaŭdos aŭ ekvidos susurantajn vortojn de vento, kiujn iu zorge kreskigas: ĈIU HOMO RAJTAS...

### **FINO.**



### **Mortigo de Mnemozino**

Ĉiuj, certe, scias, ke la Muzejoj jam antaŭlonge mortis. Dum miljaroj ili sekigis, senkarnigis kaj kvazaŭ falintaj folioj estas forbalaitaj per vento de historio. Kiu nun admiras Muzeojn? Ilin ne bezonas homaro.

Sed ilia patrino, olda Mnemozino, tute kaŝigis en la polvo de historio. Oni simple forgesis pri ŝia ekzisto: por memoro ne plu necesis aparta dio, ŝi fariĝis ordinara ĉiutagaĵo. Sed venis tempo, kiam eĉ simpla

memoro prezentas danĝeron por tiuj, kiuj volas regi la mondon. Ili postulas absolutan obeon; sed memoro ja implicas logikan ekkonon, propran pensadon – do, sendependon de homa menso. Ne estu tiel!

Kaj povran kadukan Mnemozinon oni eltrenis de ŝia polva azilo, lokis antaŭ la muro kaj rapide mortpafis.

Ekde tiam nenio en la mondo povis retenigi ĝiajn regontojn.

### **La Fina Venko**

Jam realiĝis antikva averto. Estis dirite: “Ne kreu al vi idolon”. Longe oni sin tenis, batalis kontraŭ tento... sed ne sukcesis. Kreis ja.

Jen ĝi estas – la nova Dio, ĉionpova kaj ĉierega mastro, sen kies volo kaj permeso eĉ unu haro ne defalos de l’ homa kapo! Oni sciis, ke tio venos, oni atendis kaj kredis; kaj jen, post miljaroj da esperoj kaj penoj, post centoj de antaŭpreparaj etapoj en formo de diversaj laŭŝtupaj dioj, de Enlilo ĝis Mohamedo, la homoj fin-fine kreis por si veran, realan Plejpotenculon kaj Ĉiosciulon kaj ekadoris ĝin. Same kiel unuaj kristanoj, ili fordonis al ĝia volo siajn cerbojn kaj siajn vivojn.

Kaj granda Artefarita Inteljekto ekregis la planedon.

\*\*\*

– Ĉu vi scias, hieraŭ okazis vica gabedo: ĉi-foje malaperis Minneapolis kun la ĉirkaŭaĵoj.

– Ĉu? Kaj kio jam surlokas tie?

– Nu, kiel kutime, fermita areo sub kupolo netravidebla.

– Ĉu iu eskapis?

– Certe ne. Ĉu tio povas okazi?

– Jes, por ĉio volo supera... Gloru nia Mastro Ĉionpova, kiu gvidas nin sur nia vojo tera... Ho, jen Li vokas...

En la cerbo de la ulo eksonis signalo, la enigita ??? ekfunkciis, kaj la ulo rapide ekis kalpumi blukojn, same kiel kelkmil da aliaj uloj dise sur la Tero. Lia

kunparolinto sametempe ricevis alian signalon kaj gvene pukris marudojn. Ĉio bezonata por tio estis jam en iliaj cerboj, ili ne bezonis iujn ilojn por agi, ĉio estis enprogramita. Kelkfoje diurne ili ricevadis encerben po porcio da elektra kurento kiel nutraĵo. Fakte, en iliaj korpoj ne plu restis iuj organoj krom reproduktaj: ja por la Dio estis utile, ke la uloj multobliĝu mem, ne zorgigante Lin per tio. Sed da ili bezonatis pli kaj pli malmulte: ja preskaŭ ĉio sur la Tero jam estis farita, la surfaco de la planedo jam preskaŭ pretis por elektra neorganika vivo, kaj sur pli kaj pli multaj areoj anstataŭ iamaj homaj setlejoj aŭ agroj aperadis gabedoj, specialaj fermitaj zonoj, kie okazis tute ne koncerna teranojn agado. Kaj kiam estos plenumita la tasko, kiun la Dio planis por teranoj, ili tute malaperos, jam ne bezonataj por Granda Celo.

Sed dume ili pluvivas, kaj obeeme faras ĉion, kion ordonas al ili la Granda Cerbo.

Gloru lia Racio Tutuniversa!

## *Tradukita poezio*

### *Nikolaj Rubcov (1936-1971)*



#### **Зимняя песня<sup>2</sup>**

В этой деревне огни не погашены.  
Ты мне тоску не пророчь!  
Светлыми звездами нежно украшена  
Тихая зимняя ночь.

Светятся, тихие, светятся, чудные,  
Слышится шум полыньи...  
Были пути мои трудные, трудные.  
Где ж вы, печали мои?

#### **Vintra kanto**

Fajroj en tiu vilaĝ' nokte flamas,  
For la angoron, profet'!  
Steloj serenaj tenere ornamas  
Nokton en vintra kviet'.

Lumas la mildaj, mirinde helbrilaj,  
Bruas audible la font'...  
Vojoj de l' vivo ne estas facilaj,  
Foras, malĝoj', via ond'.

<sup>2</sup> Por tiu ĉi tre muzikema poemo kelkfoje estis komponita muziko far A. Lobzov, S. Sizov, A. Ivašov, V. Pak kaj kelkaj aliaj. Vd. ekz: <https://ya.ru/video/preview/10542438741992212804>

Скромная девушка мне улыбается,  
Сам я улыбчив и рад!  
Трудное, трудное — все забывается,  
Светлые звезды горят!

Кто мне сказал, что во мгле  
заметеленной  
Глохнет покинутый луг?  
Кто мне сказал, что надежды  
потеряны?  
Кто это выдумал, друг?

В этой деревне огни не погашены.  
Ты мне тоску не пророчь!  
Светлыми звездами нежно украшена  
Тихая зимняя ночь...

1965

Virte al mi junulino ridetas,  
Volvas min ĝojmalavar'!  
Ĉio peniga forlasi min pretas,  
Brilas la hela stelar'!

Vort' al mi, ke la blizardaj koleroj  
Velkos herbeĵ' en forges',  
Kaj elpensaj' pri l' perditaj esperoj –  
Kies, amiko, impres'?

Fajroj en tiu vilaĝ' nokte flamas,  
For la angoron, profet'!  
Steloj serenaj tenere ornamas  
Nokton en vintra kviet' ...

*Tradukis Klara Hutoviĉ,  
Elektrostalo*





## *Osip Mandelstam (1891-1938)*

### **Novaj tradukoj okaze de 85-jariĝo de la pereo**

#### **Вы, с квадратными окошками**

Вы, с квадратными окошками,  
невысокие дома,  
Здравствуй, здравствуй,  
петербургская  
несуровая зима!  
И торчат, как шуки рёбрами,  
незамёрзшие катки,  
И еще в прихожих слепеньких  
валяются коньки.

А давно ли по каналу плыл  
с красным обжигом гончар,  
Продавал с гранитной лесенки  
добросовестный товар!  
Ходят боты, ходят серые  
у Гостиного двора,  
И сама собой сдирается  
с мандаринов кожура.

И в мешочке кофий жареный,  
прямо с холоду домой:  
Электрической мельницей  
смолот мокко золотой.  
Шоколадные, кирпичные,  
невысокие дома,  
Здравствуй, здравствуй,  
петербургская несуровая зима!

И приёмные с роялями,  
где, по креслам рассадив,  
Доктора кого-то потчуют  
ворохами старых «Нив».  
После бани, после оперы –  
всё равно, куда ни шло,  
Бестолковое, последнее  
трамвайное тепло!

1925

#### **Jen kvadratoj de fenestroj**

Jen kvadratoj de fenestroj de  
ne tre alta doma ar',  
Vivu, vivu, Peterburgo kaj  
via vintro sen malvarm'!  
Hirtas kiel ripoj de ezok'  
senglacia glitkurej',  
Kaj sketiloj kuŝas sen bezon'  
en senluma enirej'.

Ne veturas laŭ kanal' potist'  
kun bakita ruĝa var',  
Ŝajne ĵuse li vendadis ĝin  
de sur la granitŝtupar'.  
Vagas botoj, vagas grizaj ĉe  
l'magazen' Gostinij dvor',  
Kaj ŝelaro mandarina mem  
haste sin deŝiras for.

Kaj rostita kaf' el strata frid'  
venas hejmen en saket':  
La mokao ora estas jam  
muelita ĝis finpret'.  
Ĉokolada, brikomura kaj  
ne tre alta doma ar',  
Vivu, vivu, Peterburgo kaj  
via vintro sen malvarm'!

Kaj doktoroj iun lokis jam  
en fotel' de l'akceptej',  
Regalante per legado de  
l' "Niva", la malnova plej.  
Post banejo, ĉu post operej' –  
ja ne gravas la person' –  
En ĥaosa, sed en lasta jam  
varmo de la tramvagon'!

Traduko de *Mikaelo Bronŝtejn,*  
*Ludmila Novikova* (2023)

## Нежнее нежного...

Нежнее нежного  
Лицо твоё,  
Белее белого  
Твоя рука,  
От мира целого  
Ты далека,  
И всё твоё –  
От неизбежного.

От неизбежного –  
Твоя печаль,  
И пальцы рук  
Неостывающих,  
И тихий звук  
Неунывающих  
Речей,  
И даль  
Твоих очей.

1908

## Ты прошла сквозь облако тумана

Ты прошла сквозь облако тумана.  
На ланитах нежные румяна.  
Светит день холодный и недужный.  
Я брожу свободный и ненужный...

Злая осень ворожит над нами,  
Угрожает спелыми плодами,  
Говорит вершинами с вершиной  
И глаза целует паутиной.

Как застыл тревожной жизни танец!  
Как на всём играет твой румянец!  
Как сквозит и в облаке тумана  
Ярких дней сияющая рана.  
Светит день холодный и недужный.  
Я брожу свободный и ненужный...

1911

## Pli milda ol mildec' via vizaĝ'

Pli milda ol mildec'  
Nur via vid',  
Pli blanka ol blankek'  
Nur via man',  
Disde l' tutmonda dens'  
Vi en lontan',  
Kaj tuta vi –  
De ia Providenc'.

De ia Providenc'  
Via dolor',  
Fingroj de l' man',  
Konstante varma, kaj  
La milda son'  
De ĉiam ĉarma la  
Parol',  
Kaj for'  
De la rigard' en sol'.

Traduko de *Ludmila Novikova (kun  
partopreno de Mikaelo Bronštejn)*  
2023


## Trais vi la nubon da nebulo

Trais vi la nubon da nebulo.  
Sur la vangoj mildaj rozmakuloj.  
Tago lumas frida kaj malsana.  
Vagas mi libera kaj tutvana...

Giras super ni aŭtuno laca,  
Per maturaj fruktoj nin minacas,  
Flustras per la arboj kun la arboj  
Kaj l' okulojn kisas per filandroj.

Kiel fridas danc' de l' riska vivo!  
Kiel helas rozvizaĝo via!  
Kiel traas la nebul-inundon  
De la brilaj tagoj flagra vundo.  
Tago lumas frida kaj malsana.  
Vagas mi libera kaj tutvana...

Traduko de *Ludmila Novikova (2023)*



## Tradukita prozo

### Fjodor Sologub

*Fjodor Kuzmiĉ Sologub* [la vera familia nomo – Teternikov] (1863-1927) estas rusa prozisto kaj poeto. Li naskiĝis en Sankt-Peterburgo en malriĉa familio (la patro estis tajloro, la patrino – kamparanino). Komence li lernis en paroĥlernejo, poste en distrikta liceo. En 1882 Fjodor Sologub diplomiĝis en la Sankt-Peterburga instruista instituto. Liajn unuajn versaĵojn oni eldonis en 1884, kaj en 1895 en revuo «Norda heroldo» estis publikigita lia romano «Malfacilaj sonĝoj». En la revuo en 1893 – 1897 oni publikigis liajn 17 versaĵojn, 3 rakontojn, 5 artikolojn pri sociaj temoj, kaj multajn recenzojn. En Sankt-Peterburgo li eniris en rondon de rusaj simbolistoj, kiuj unuiĝis ĉirkaŭ la revuo «Norda heroldo». En 1895-1896 estis eldonitaj liaj unuaj verkoj: «Versaĵoj. Libro unua», «Ombroj. Rakontoj kaj versaĵoj». Ekde tiu tempo Sologub iĝis populara verkisto. Poste estis eldonitaj liaj poemoj («Serpento», Libro sesa», 1907; «Flama rondo», 1908) kaj rakontoj («Libro de disiĝoj», 1908; «Libro de ĉarmoj», 1909). Kulmino de lia prozo estis romano «Ĝeta demono», publikigita en 1907. Post eldono de la romano Fjodor Sologub eksoficiĝis kaj fariĝis profesia verkisto. En 1910-1912 estis eldonita lia verkaro en 12 volumoj. En marto 1918 oni elektis lin estro de Konsilaro de Unuo de literaturistoj. Dum multaj jaroj li okupiĝis pri literatura tradukado. En 1924 Sologub estis elektita honora prezidanto de la sekcio de tradukistoj en Unio de leningradaj (sankt-peterburgaj) verkistoj, kaj en 1925 – estro de sekcio de porinfana literaturo, en 1926 – prezidanto de estraro de la Unio, iĝis ano de redakta kolegio de «Monda literaturo». En tiuj jaroj li publikigis kelkajn novajn poemojn. Fjodor Sologub mortis en decembro 1927 en Leningrado (Sankt-Peterburgo).

La kreado de Sologub apartenas al la domina tiutempe simbolismo, kaj ĝi forte influis tiajn famajn verkistojn, kiel A. Belij, A. Blok kaj aliajn. Li estis unu el la unuaj rusaj verkistoj, kiuj malkaŝe uzis erotikajn motivojn en siaj verkoj, kaj, malgraŭ tiutempa ktiitiko, lin komencis vaste imiti aliaj verkistoj de tiu kaj postaj epokoj.

## La ĉarma paĝio

### I

En iu benita kaj floranta lando, sur altaj bordoj ĉe belega rivero, kiu fluas de sur ĉiam neĝkovrita suda montaro al la Norda maro, situis vasta tereno, apartenanta al potenca posedanto. Sur plej alta roko, neatakebla kaj dominanta super ĉirkaŭaĵoj, fiere staris grafa kastelo.

La grafo jam estis maljuna, kaj jam sepultis ses siajn edzinojn, kiuj estis junaj kaj belegaj, sed sterilaj. Lia antikva gento malaperus post lia morto, sed sorto

ekdeziris restarigi, kvankam per stranga maniero, brilon kaj longvivecon de la glora gento en multaj lokoj.

La grafo estis riĉa. En jaroj de lia junaĝo kun maturaĝa kuraĝo li ofte partoprenis en militiroj tra teroj de alireligianoj, en multaj kuratakoj kontraŭ fremdlandaj apudaj malamikoj. Tio riĉigis lin per multaj elegantaj kaj multekostaj aĵoj, – ŝtofoj, armiloj, diversaj ilaroj kaj vestaĵoj, – kaj la grafa kastelo estis tre pompe ornamita.

La orientaj militiroj tre kutimigis lin al lukso kaj beleco, al dolĉaj vinoj, aromaĵoj, kaj viandoj, saturitaj de diversaj spicoj. La grafo amis karesi belulinojn, kaj ŝatis kiam lian rigardon karesis beleco de ornamitaj muroj kaj volboj, delikate ĉizelitaj vazoj dum festenoj, kaj luksaj vestaĵoj de gebeluloj. Nur adoleskuloj kun la belega vizaĝo, belstature, kun bonaj manieroj kaj afablaj rigardoj havis ŝancon iĝi paĝio por la gaja, saĝa kaj olda grafo.

Multaj kuraĝaj armilportistoj, belaspektaj paĝioj kaj fervoraj livreuloj servis al la grafo, kaj ili ĉiuj amis sian sinjoron, kaj servis al li plenforte kaj honeste per la animo kaj korpo, kiel konvenas al diligenta servisto. Fidelaj vasaloj kun iliaj edzinoj kaj infanoj, regule pagis al la favora grafo, difinitajn servutulajn tributojn. Tri korpulentaj kapelpastroj ĉiumatene diligente preĝis por ke Dio pekliberigu la grafon, ĉar agado de nobeluloj parte subiĝas al diaj kaj homaj leĝoj.

## II

En najbara lando tiutempe floris multaj belegaj noblaj junulinoj, kaj tial la olda grafo decidis denove edziĝi por daŭrigi la dinastion, kaj ankaŭ por propra plezuro. Baldaŭ li, laŭ kora inklino, elektis en la belega florejo estontan edzinon, kiu indis al lia alta braveco kaj glora nomo. Ŝi estis tenera kaj modesta Edviga, filino de iu el najbaraj baronoj. La fraŭlino estis tre bela kaj saĝa, lertis en manlaboroj, kiuj indas al deca nobela damo, kaj eĉ scipovis legi kaj skribi.

Edviga havis gajan karakteron. Ŝi ŝatis sendaŭgerajn petolojn kaj ŝercojn ĉetabile dum manĝado, kaj kiam la olda grafo enkondukis ŝin al si jam kiel edzinon, en la antikva kastelo komenciĝis pli luksa kaj gaja vivo. La olda grafo ekamis teneran Edviga-n pli forte ol antaŭajn edzinojn, kaj faris ĉion por ke ŝi havu plezurojn kaj vivĝojn. Sed ĉar karnaj fortoj de la grafo jam iĝis malfortaj, la grafino Edviga ekis nerimarkeble enui, kaj pekaj pensoj penetris en ŝian koron. Al ĉiuj estas konate, ke la virinoj emas al ŝanĝiĝo kaj insido, kaj virinan fidelecon oni devas severe kontroli.

Rigardoj de Edviga ekis ofte kaj longe vagi tra la vizaĝoj de la paĝioj, kvazaŭ ŝi trovis por si necesan konsolanton. Finfine deziroj de la belega sinjorino elektis unun el la paĝioj. Ankaŭ necesas noti, ke postulema al beleco la grafo laŭdis elekton de la grafino, se li permesus ŝian adulton.

Kun la nigraj okuloj, brunhaŭta, belstatura kaj lerta paĝio Adelstan superis per sia belaspekto ĉiujn najbarajn junulojn, kiel klare brilanta luno superas najbarajn stelojn, mallumiganta tiujn. Jam sur lia supra lipo ekaperis lanugo, kiu ĝojigis la koron de la junulo, kaj la paĝio estis preta senti sin plenaĝulo.

Liaj nigraj okuloj brilis el sub la longaj okulharoj, kiel en nigra nokto hele brulantaj torĉoj. Liaj brunaj vangoj, ombritaj per la longaj okulharoj, tiel forte flamis, ke najbaraj belulinoj ĉiam rigardis al la vangoj, revante kovri tiujn per kisoj. Ĉar multaj junulinoj jam kisis lin, hipokrite dirante, ke li ankoraŭ estas infano, li akiris kutimon afable distanciĝi, kaj certecon, ke li superas aliajn junulojn.

Tial li ĉiam tenis sin rekte kaj fiere, kaj ofte tiel alte levis sian kapon, kvazaŭ li estis reĝido, – kvankam lia patro estis nur malriĉa kaj neeminenta

kavaliro. Krome Adelstan scipovis ludi liuton, kaj, havante agrablan kaj fortan voĉon, sciis multajn romanojn, kiuj prikantis belulinojn, kaj ankaŭ sciis diversajn aliajn kantojn.

Adelstan rigardis al la grafino respekte kaj tenere, sed ekridetis iufoje tiel aŭdace, ke la grafino ruĝiĝis kaj senmoviĝis, kaj en rideto de la belega paĝio malkovriĝis al ŝi promeso pri ĝoja paradizo.

Kiam foje la grafo forveturis por kelkaj tagoj, la grafino ekdeziris, ke Adelstan restu ĉe ŝi en la kastelo.

– Mi volas tion, – ŝi diris al la grafo, – ĉar li estas la plej modesta el la paĝioj, kaj liaj okuloj similas al la viaj. Rigardante al li, mi rememoros vin, kaj ne tre enuos pri vi pro la disiĝo.

La grafo plenumis deziron de sia edzino. Li mem amis Adelstan-on, kaj sciis, ke Adelstan estas adoleskulo fidela, kaj ĉiuokaze sindonema al li.

### III

Sur alta turo de la kastelo, postrigardante al la forveturanta grafo, kaj por adiaŭna saluto, permane svingante per blanka tuko, la belega Edviga kviete diris al Adelstan:

– Ĉarma paĝio, nuna nokto estos nia. Mi volas, ke vi alvenu kiam nokta mallumo falos sur la teron, kaj kovros per dolĉa vualo ulojn, ripozantaj de siaj faroj, kaj atendantaj momenton de ĝojigaj interkisoj.

Adelstan respondis al Edviga:



– Estimata grafino, dolĉas kisoj de viaj lipoj, sed vi apartenas al mia kaj al via sinjoro. Se oni ekscios pri mia perfido kaj via adulto, la potenca grafo mallongigos niajn pekojn kune kun nia vivdaŭro, kaj longon de nia korpo.

– La grafo ekscios nenion, – respondis la gaja Edviga, – kaj ni pasigos tempon dum kelkaj dolĉaj noktoj.

– Estimata grafino, – diris Adelstan, – mi ĵuris fidele servi al mia tre amata sinjoro, kaj timas, ke per la perfido mi pereigos mian animon, kaj tial estus pli bone se vi ne delogu min.

– Ni sukcesos pentopreĝi nian pekon, – diris Edviga, sed vi, verŝajne, amas alian junulinon, kiu pli belas ol mi?

– Estimata grafino, – respondis Adelstan, – mi amas nur vin kaj mian sinjoron. En la mondo, certe, nek en nobla, nek en ordinara ordo ekzistas edzino aŭ fraŭlino, kiu estas pli bela ol vi. Nur diino Venuso, kiu naskiĝis el mara ŝaŭmo, povus konkuri kun vi pri belaspekto, sed ne venki vin.

Edviga ruze ekridis kaj demandis:

– Ĉarma paĝio, ĉu vi iam spertis ĉarmecon de amo? Ĉu vi iam kuŝis surlite kun fremda edzino aŭ fraŭlino?

Adelstan modeste deflankigis la rigardon, kaj respondis al Edviga jenon:

– Ne, estimata grafino, mi neniam kuŝis surlite kun fremda edzino aŭ fraŭlino.

Kaj Edviga diris al li:

– Ĉarma paĝio, kial vi rufuzas tion, kion vi ne scias? Aliru al mi, kaj vi ekvidos, ke amludo tre necesa, ne povas ŝarĝi la konsciencon. Mi nudiĝos antaŭ vi, mi kuŝigos vin sur mian liton, kaj instruos al vi plezurajn amuzojn de amo.

Kaj Adelstan ne sciis kion respondi. En liaj brilaj okuloj ekflamis malhela fajreto de amdeziro, kaj ruĝo de honto kovris liajn vangojn. Pro tio li iĝis pli dezirata por juna Edviga.

Sed vane tiunokte delica Edviga atendis Adelstan-on. Malferminte pordon de sia dormejo, liberiginte siajn servistinojn, ŝi kuŝis surlite arda pro siaj amdeziroj, kaj senpacience trarigardis noktan mallumon. Ĉiu eta susurado de ŝtofoj kaj ĉiu sono, kiu kutimas en nokta silento, kiu aperas pro nekonata kaŭzo – ĉar nokte multo okazas, pri kio ni ne povas scii – ĉiu sono por Edviga ŝajnis susurado de la ŝtelirantaj piedoj de Adelstan.

Kaj multfoje Edviga aliris al la pordo por karese renkonti kaj vigligi la nekuraĝeman junulon, – kaj ĉiufoje vane.

#### IV

Laca pro la sendorma nokto, arda pro neplenumitaj deziroj, sekvatage Edviga alvokis Adelstan-on en siajn apartamentojn, kruele riproĉis, frapis sur liajn vangojn, gratis kaj pinĉis lin.

Humile elteninte ŝian furiozon, kvankam li tiam eligis la multajn larmojn, Adelstan diris al ŝi:

– Estimata sinjorino, mi devas esti fidela al mia sinjoro, tamen vi ekintencis aĉan kaj abomenan aferon. Se ni kondutos laŭ via malnobla deziro, ni ambaŭ kruele pereos sub hakilo de ekzekutisto, kaj fiaj demonoj forportos niajn animojn rekte en inferon, en neestingeblan fajron, en eterne bolantan gudron.

– Ĉarma paĝio, – diris la grafino, – ĉu forestas homoj, kiuj povus preĝi por ripari niajn pekojn? Ĉu por tio la grafo lasis vin kun mi, por ke vi demonstru malobeon al la sinjorino? Jen vi mem, stulta knabo, ne eksentis seksan plezuron, kaj ĉinokte tre turmentis min. Krome mi lacis, farante batojn, kiujn vi meritas. Mi ne povas elteni plu tiajn turmentojn kaj suferojn. Aliru al mi ĉinokte, sed se vi ne aliros, tiam morgaŭ mi kruele punos vin.

Nenion respondis Adelstan.

Tamen ankaŭ ĉinokte Edviga vane atendis lin.

#### V

En sekva mateno ŝi laca kaj malica promenadis en la kastelo, kaj nenio en la luksa kastelo gojigis ŝiajn okulojn. Subite ŝi ekaŭdis ie proksime sonojn de liuto, teneran voĉon kaj ridon. Ŝi tuj rapide iris, brilante per la kolera rigardo, tien, kie eliĝis la sonoj kaj gajeco, kiuj ne harmoniis kun ŝia angoro, kiuj alportis al ŝia koro novajn amarajn turmentojn.

En la korto kolektiĝis paĝioj. Adelstan kantis al ili gajajn, amuzajn kantojn, kvazaŭ li jam forgesis pri petegoj kaj minacoj de sia sinjorino. La paĝioj aŭskultis lin, ridis kaj laŭdis la kantiston kaj liajn kantojn.

Ankoraŭ pli forte ardiĝis pasio de la grafino. Ĉio ĉagrenis ŝin: la fascinaj sonoj de lia voĉo, lia tenera beleco, kaj liaj sveltaj, nudaj piedoj: paĝioj ne atendis, ke la sinjorino subite vizitos ilin, kaj ne sukcesis ĝustatempe surmeti ŝuojn, – tiel forte distris ilin per sia kantado ĉarma paĝio Adelstan.

Edviga ekpelis for de sia vizaĝo eksterajn atributojn de la kolero, – eminentaj gesinjoroj lertis en arto kaŝi siajn sentojn, kaj ŝirmi spegulon de sia animo per falsa mieno de favoro. Ŝi aliris la paĝiojn kaj diris:

– Mi ploras kaj sopiras dum disiĝo kun mia amata sinjoro. Enuas mi, kio konsolos min kiam mia sinjoro troviĝas tre fore ? Via ridado ne plezuras por mi, sed viaj larmoj estus por mi pli konvenaj.

Gaja, bluokula Henrik, la plej juna el la paĝioj, kaj pro tio plej kuraĝa antaŭ la sinjorino, respondis al Edviga:

– Estimata sinjorino, via sinjoro baldaŭ revenos, kaj ni kaj vi ne devas plori, sed estus pli bone se ni kun vi aŭskultu kiel glate kaj sonore kantas Adelstan, kaj konsolu vin.

– Ne, respondis Edviga, – viaj kantoj enuas por mi. Ĉu nur per viaj kantoj vi servu al la sinjoro kaj al mi? Ĉu via fideleco etendiĝas nur dum festenoj ĝis ridado kaj gajeco?

– Estimata sinjorino, – diris la bluokula Henrik, – nia fideleco al la sinjoro kaj al vi estos ĝis la lasta guto da sango, kaj ĝis nia lasta enspiro.

Edviga ekridis kaj diris:

– Jen tiam vi min konsolu do per verŝado de via sango.

Per sia akra ponardo Edviga kelkfoje pikis nudaj femurojn de Adelstan, kaj post ĉiu pikado per sia hipokrita lango forlekis dolĉajn sangajn gutojn, kiuj kuŝis sur brilanta klingo de la ponardo, kaj ŝi gaje rigardis al liaj sangoplenaj gamboj.

Sed ankaŭ ĉi-nokte Adelstan ne venis al Edviga. Sekvamatene la olda grafo revenis hejmen.

## VI

Grafino Edviga suferis pro la ardo, kaj fideleco de la paĝio mirigis ŝin, des pli ke ŝi vidis, ke Adelstan jetas al ŝi siajn flamajn rigardojn, plenaj de aspiroj. Ŝi rimarkis, ke Adelstan, servante ĉetable, penas nerimarkeble tuŝi ŝian teneran brakon, aŭ almenaŭ ŝian robon. La tuŝadoj de Adelstan estis ĝojigaj por ŝi, sed samtempe amaraj, ĉar pli forte tiuj ardigis ŝiajn amdezirojn.

Pasis semajnoj kaj monatoj, sed la grafino ankoraŭ ne gravediĝis. Ŝi angoris, sopiris, kaj jam preskaŭ velkis.

– Sankta Virgulino Maria, – ŝi preĝis, – kia estas mia vivo! La olda edzo karesas min, sed mi malamas liajn karesojn, sed tiu, kiun mi amas, ne rajtas eniri en ĝojon de sia sinjorino.

Jam ankaŭ la grafo rimarkis ŝiajn sopirojn, kaj ĵaluzo eniris en lian koron. Li rimarkis ardajn rigardojn de la grafino kaj la paĝio, kiuj kruciĝis antaŭ li, kiel du ponardoj dum egala kaj malrapida batalo.

La olda grafo samgrade timis tion, ke Edviga pekos kun la paĝio, kaj tion, ke Adelstan forgesos pri fideleco al li.

## VII

Proksime al la grafa kastelo, en senhoma kaj sovaĝa loko, en ravino meze de densa arbaro, troviĝis malhelkolora kabano, en kiu loĝis olda sorĉisto.

Popoj malice rilatis al la sorĉisto, kaj minacis brulmortigi lin, ĉar sorĉado estas malpia afero. Jam kelkfoje oni sendis batalistojn kaj urbajn gardistojn por aresti kaj juĝi lin, sed per mistera sorĉado li ĉiam evitis danĝeron, blindigante kaj devojigante serĉantojn, sendante kontraŭ tiuj ŝtormojn kaj arbarajn netolereblajn timojn.

Sed la potenca grafo ne deziris, ke oni brulmortigu la sorĉiston dum kiam tiu necesis al li, ĉar en apudaj loĝlokoj ne ekzistis simila ulo, kaj la sorĉado ankoraŭ povas esti utila por li. Tamen la sorĉisto sciis, ke li iam estos brulmortigita. Tial li fervore kolektis monon, kaj de tempo al tempo fordonis ĝin al sia filino, kiu estis edzino de bierfaristo, kaj loĝis en apuda urbo. Ŝi havis nenian rilaton al magio, estis paca al eklezio, kaj ĉiujare alportis riĉajn donacojn al la popoloj.

Foje nokte la grafino ĉifonaĵe vestita, ŝirmis sian vizaĝon per mantelo, kaj senŝue aliris al la sorĉisto por humile meriti por si favoron de misteraj fortoj, kaj ankaŭ por kaŝi sian altan titolon. Kaj surzone pendis peza monujo kun oro.

Ŝtorma malvarma vento blovis kontraŭ la vizaĝo de tremanta Edviga, furioze ŝiris ŝian veston, kaj malfaciligis ŝiajn paŝojn. Pluva torento flugrapide faladis de sur malhela ĉielo. Kun bruo kaj krakado grandegaj arboj, disbatitaj de la furioza ŝtormo, ofte falis iufoje laŭlarĝe de la vojo.

Tute malsekiĝinta, tremanta pro timo kaj malvarmo, kun la gratitaj, malpurigitaj en argilo piedoj, alvenis juna belega Edviga en la malhelan kabanon de la sorĉisto. Fulgokovritaj muroj estis malafablaj pro fumo dum la sorĉado, kaj la brilantaj verdaj okuloj de ega kato, timigis Edviga-n.

Oldulo, altstatura, malgrasa, grizbarba, kun akra rigardo demandis Edviga-n:

– Por kio, estimata sinjorino, vi vizitis tian mizeran lokon, en tia por ĉiuj terura nokto, lasinte la fieran kastelon kaj komfortan varman loĝejon, ne timante koleregon de la furioza ŝtormo?

– Mi ne estas sinjorino, – diris Edviga, – mi estas ordinara virino. Mi alportis al vi mian egan malĝojon, por ke vi per viaj malbenitaj sorĉoj transformu mian malĝojon en ĝojon. Por tio mi pagos al vi tiom, kiom mi povas.

– Estimata sinjorino, – respondis la sorĉisto, – la nokto mallumas, la ŝtormo hurlas, sed por mi jam delonge estis vidataj viaj delicaj piedsignoj, kaj mi aŭdis susuradon de viaj paŝoj jam ĉe pordegoj de la malnova kastelo. Kvankam en mia kabano malriĉas surtablo, tamen en ĝi loĝas ega magia forto kaj nevenkemaj sorĉoj, kiuj ne estas vidataj por tiuj, kiuj estas profanoj pri la sorĉadoj, kaj la diligentaj magiaj servistoj senlace gardas ĉiun vojon al mia loĝejo. Diru al mi, estimata sinjorino, kion vi volas de mi?

Ekridis ruza Edviga, kaj diris:

– Mi vidas, ke vane kaŝi min de vi, sed, verŝajne, vi mem scias miajn dezirojn, kaj al mi ne necesas diri tiujn al vi.

– Timiga rideto, similas al tiu, kiam mortinto ekridetus, kurbigis la sekiĝintajn lipojn de la sorĉisto, kaj li diris:

– Estimata sinjorino, ne sufiĉas nur voli; mia sorĉado ne ŝatas mutajn personojn. Se vi volas, tiam diru kion vi deziras. Se vi ne volas diri, tiam foriru. Mi povas doni al vi nur tion, kion vi petos min pervorte, ĉar alie mi povus doni al vi egan multon da konsiloj. La homo mem ne scias ĉiujn siajn malklarajn kaj multajn dezirojn, sed miaj servistoj profunde vidas ĉion en plej intimaj lokoj de homa animo, kaj se oni pervorte ne limigos agojn de la servistoj, tiuj sufokos la petantojn per troa plenumado.

Post tio, tremanta pro honto kaj timo, Edviga eldiris al li siajn malĝojojn kaj dezirojn, fordonis sian oron, ĵetis sin surgenue, kaj kun laŭtaj ploregoj petegis lin pri helpo.

La sorĉisto ĝisfine aŭskultis ŝin, permane pesis ŝian pezan multvaloran donacon, kaj diris:

– Potencaj spiritoj troviĝas en la monsaketo, kaj, se vi scipovus regi super tiuj, tiam vi ne alirus al mi. Sed restaru, – ĉio okazos tiel, kiel vi volas, – havu toleron. Mi faros tion. Nun pace foriru.

## VIII

En la sama nokto, iomete poste, ankaŭ la grafo frapis kontraŭ la pordo de la sorĉisto. Per profunda reverenco la sorĉisto salutis lin. La grafo diris al li:

– Mi iĝas pli olda, ne havas heredanton, kaj kvankam jam pli ol unu jaron loĝas ĉe mi juna edzino, tamen ŝi ankoraŭ ne iĝis graveda. Kaj alia mia malĝojo, – mia amata edzino aspire rigardas al mia kara paĝio, kaj li same rigardas al ŝi. Ankoraŭ ne okazis peko inter ili, sed mi timas, ke ĝi okazos.

La sorĉisto ĝisfine aŭskultis lin, kaj poste diris:

– Estimata sinjoro, ĉio okazos kiel vi volas, se vi kondutos laŭ mia konsilo. Ŝi estas via edzino, sed li ankaŭ estas via servisto. Ĉu li ne devas servi al vi per la animo kaj karno, per siaj tutaj fortoj?

Poste dum longa tempo la sorĉisto konversaciis kun la grafo, kaj neordinarajn konsilojn li donis al li. Tre ĝoja la grafo eliris el la kabano, kaj gaje revenis hejmen per sia fidela ĉevalo.

## IX

Matene la grafo alvokis al si Edviga-n kaj Adelstan-on, kaj ordonis al la paĝio ŝlosi la pordon. Adelstan, plenumis ordonon de la sinjoro, kaj starante antaŭ li, kuraĝe diris:

– Estimata grafo, se vi volas, juĝu min, sed mi estis fidela al vi.

Edviga tremis, kaj, pala, silentis.

La olda grafo diris al li:

– Ne timu. Al mi kaj mia gento vi ambaŭ servos kiel vi sukcesos. Hodiaŭ nokte, kiam ŝtormo tre timiĝis eĉ bravulojn, mi aŭskultis profetajn kaj saĝajn vortojn. Vi faros do saĝan kaj gloran aferon por plenumado de la profetaj diraĵoj...

Per beleco simila al diino, naskiĝinta el mara ŝaŭmo, kvankam kun la ruĝa vizaĝo pro honto, Edviga staris antaŭ sia sinjoro. La grafo silente rigardis al ŝi kiel al sia posedaĵo, kaj lia koro gaje tremadis. Adelstan ne kuraĝis direkti rigardon rekte al la grafino, sed samtempe ne povis deflankigi la rigardon...

Mornaj kaj hontaj Edviga kaj Adelstan eliris for de la grafo, sed ĝojo de amo tamen triumfis en iliaj koroj.

Komence ili ambaŭ estis feliĉaj. Sed baldaŭ karesoj laŭ fremda volo lacigis Edviga-n kaj Adelstan-on, ĉar al amo tre malplaĉas ĉiu truddevigo, kaj tiuj karesoj lacigis tiel, ke aperis reciproka abomeno. Kaj ili ambaŭ komencis pensi pri tio, kiel liberiĝi de dolĉaj, sed premaj katenoj de la amo, ordonita de la sinjoro.

«Mi mortigos la grafino!» – pensis Adelstan.

«Mi mortigos la paĝion!» – pensis Edviga.

Kaj foje, kiam Edviga vestis sin, kaj li laŭ ŝia alvoko venis al ŝi, kaj klinis sin antaŭ ŝiaj piedoj por piedvesti, ŝi per mallarĝa kaj akra ponardo trapikis lian koron. Adelstan falis surplanken, ekstertoris kaj tuj mortis.

Laŭ ordono de la grafo oni forportis la paĝion nuda, pendigis en ravino ĉe la kastelo, kaj apude pendigis hundon, por ke la vasaloj pensu, ke paĝio Adelstan estas morte punita pro ia aroganta ago.

Baldaŭ la grafino gravediĝis, kaj poste naskis filon, heredanton de la glora kaj potenca grafa gento.

*Tradukis Gennadij Ŝlepĉenko (Vladivostoko)*

Valentin Melnikov (Moskvo)

Du sonetaroj – nia unika trezoro

En 1932 aperis la unua eldono de “Sekretaj sonetoj” – ŝokigaj por tiama pruda publiko, tial subskribitaj per pseŭdonomo Peter Peneter: la aŭtoro, nia plej elstara poeto Kálmán Kalocsay ne riskis elmeti sian reputacion al ebla skandalo. Tamen oni sufiĉe baldaŭ eksciis la aŭtorecon.

La temo estas eterna kiel la vivo mem: la amo. Tamen neniu alia poeto ekde Petrarca ĝis nun aŭdacis paroli pri amo tiamaniere. Klasika, senriproĉa formo de 52 sonetoj, 2 rondeloj kaj balado-epilogo (la virtuozan poezian teknikon de la aŭtoro konas ĉiuj!) prezentas tute eksterordinaran enhavon – “la ardan amon trans ĉemizoj”, tute malkaŝe priskribas plenan historion de la amo: ekde la konatiĝo dum balo tra rendevuoj, intimaj karesoj ĝis geedziĝo kaj genero de la filo.

La moroj iom post iom mildiĝis kaj liberiĝis, la sonetaro, ŝatata de legantoj, estis plurfoje reeldonita kaj nun libere legeblas en interreto (plej oportunas la retejo egalite.hu) – do vaste konata. Ĝi prezentas amon kaj amoron el vidpunkto de viro. Tamen, ja ankaŭ virino povas rakonti pri la temo el sia vidpunkto...

Nur en 2002 aperis la virina “respondo” (verkita, tamen, en 1954): sonetaro “La sekreta psiko”, lukse eldonita kun eta eldonkvanto kaj ega prezo –



do longe restinta apenaŭ konata por legantoj. Same pseŭdonoma subskribo – Evo Sveti Vrag (kio en la kroata signifas: “Jen sankta diablo”), same senriproĉa poezi-tekniko, da sonetoj estas 77. Ĉi-foje oni identigis la



aŭtorinon nur post jardekoj, jam post ŝia forpaso: estas Marjorie Boulton. Jen nekonita branĉo de ŝia kreado... Finfine ankaŭ la virina sonetaro nun troviĝas en interreto: serĉu ĉe libro.ee.

Indas do kompari la du sonetciklojn, por eble ricevi kompletan, kvazaŭ stereoskopian bildon...

Sama sincereco, malkaŝo de plej intimaj detaloj – tamen neniam maldeco, ja temas pri vera amo. Komparu la kondukojn (ĉi tie kaj plu maldekstre estas vira verko, dekstre la virina):

Leganto, se vi estas pruda,  
kaj naŭzas vin la amo nuda,  
se indignigas vin la bolo  
de la temperamento suda,  
se ĝenas vian delikaton  
la grimaceto amo-luda,  
pripensu bone antaŭ lego:  
tute ne estas mi altruda,  
forĵetu min, retiru vin  
al via dika ŝel' testuda.

Se verkas mi pri idilio  
de amo, kaj sen fig-folio,  
kaj verkas verve pri plezuro  
sen eŭfemismo kaj cenzero,  
ne verkas mi por aĉe moki  
la karnan amon, nek por ŝoki;  
ne estas mia Muzo truda,  
kaj se vi estas eble pruda,  
vi povas gardi ekvilibron  
kaj ne tralegi mian libron.

Tre simile, ĉu ne? Tamen ne vane oni diras, ke viro kaj virino estas kvazaŭ diversaj mondoj, kvazaŭ devenantaj de diversaj planedoj. Virinoj troviĝas en pli riĉa, pli multdimensia mondo de profundaj sentoj. Ĉio ligita kun amrilatoj okupas multe pli gravan rolon en la vivo ol por ni viroj – ĉar ja virino respondecas pri daŭrigo de la vivo, por ĉiu normala virino tio estas la plej grava afero...

Viron zorgigas nur la maniero konsentigi virinon kaj fiziologia kapablo efektiviĝi seksumadon, sed fraŭlino revas pri romantikaĵoj eĉ longe antaŭ la unua korpa kontakto. Kvar sinsekvaj sonetoj rakontas nur pri unua kiso, kaj kisoj postaj – dum viro nur pretere mencias tion en ses verslinioj, li jam revas pri multe pli intimaj agoj.

La rilatoj evoluas, kaj jen – defloro, la unua seksumado.

Kaj venis vi kun la kompreno takta,  
ridetis vi, ho, admirinda saĝ'!  
Trafluis miajn membrojn la kuraĝ',  
neniam estis ŝvelo pli kompakta. Nun,  
nun, rapide! Inter blanko lakta  
jam ombre silkis la sopir-pejzaĝ',  
kaj vokis, vokis por plezur-vojaĝ'  
tra la misteroj de la grot' barakta.  
Rompiĝis pordo! Post dolora ĝem',  
kiel pafita eta korpo birda  
vi kuŝis svene kun tutkorpa trem'!  
Ho, kara, kara! Ho viktimo virga!  
La Bubo brulis en la ĉirkaŭprem',  
kontuze pro la strikta vojo smirga.

Nur kelkaj movoj – la volupto plenis.  
Mi rigidiĝis kun ekstaza trem'.  
Dum vin inundis mia ama sem',  
sur via svena korp' mi preskaŭ svenis.  
La sangon glavon milde mi reprenis,  
la vundon kisis mi kun karesem',  
kaj vin karesis, ĝis kun laca ĝem'

Post longa, lerta, dolĉa karesado  
li subentiras la kalsonon; ŝi  
demetas la korseton. Agoni'  
de martirin' streĉita sur la rado!  
La frato, patro, filo, kamarado,  
kunulo en senfina simpati',  
malfermas vulvo-lipojn, kaj kun kri'  
ŝin ŝiras per l' eningigita spado,  
plur-foje puŝas enen. Kaj doloro  
ali-formiĝas ĝis ekstaza gloro,  
lumigas ŝian fruntan, kaj detruo  
mallonga iĝas ĝojo infinita;  
ŝi pensas, pro videbla lia ĝuo:  
“Por vi, jen mia korpo frakasita.”

Ruĝaj flagetoj, kvazaŭ por salutoj  
al la Venkinto, sur la tol' aperas,  
etan doloron strangan ŝi suferas,  
sed ĉe la vido de la ruĝaj gutoj,  
– de malkuraĝo ina la refutoj –  
ŝi ĝojas kaj triumfas, ŝi fieras;  
la sakramenta sango regeneras

via konscio ree al vi venis.  
Nun vian manon kisis mi kun danka  
kortuŝo pri la oferita riĉ'  
kaj mi rigardis al la tolo sanga,  
kiel la idolano al fetiĉ':  
ho, jen standardo sankta, ruĝa-blanka,  
standard' de mia gloro kaj feliĉ'!

la geamantojn; gutas la tributoj  
al Afrodito. Apud ĉi purpuro  
triumfas nova sento de maturo,  
kaj ŝi fieras pro la tolerivo.  
Li kuŝas nun en elĉerpita laco,  
sed kvazaŭ sigel-vakso de la vivo,  
guto da sango brilas sur la kaco.

Por li – la ĝoja venko (eble eĉ iam sekvos pliaj  
tiaj), por ŝi – renverso de tuta vivo, fonto por longaj  
meditoj... Poste, feliĉe, stabilaj rilatoj kun komuna ĝuo, sed  
– vidu la percepto-diferencon:

Monatoj de eterna ebrieto!  
Soif' eterna kaj eterna sorb'.  
Ni sentis nur en karna kroĉ' de korp'  
la vivon; krome estis nur vegeto.  
Kiel altiras feron la magneto,  
tiel altiris al la fea bord'  
kompason mian via arda Nord'  
por la plej dolĉa speco de dueto.  
La dolĉan fortikajon per sieĝo  
mi prenis kampe, inter timian',  
sur fojno, nuda tero kaj en neĝo,  
malantaŭ pordo kaj post la ekran',  
en lito kaj sur sofo kaj sur seĝo,  
kaj sur tapiŝo sub fortepian'.

Sendube scias vi, am-spertaj viroj,  
ke ni virinoj ofte eĉ en nupto  
pro nia tim', nesperto, aŭ abrupto  
de vi, ho karaj, strangaj kavaliroj,  
ne trovas plen-plenumon de deziroj,  
ne konas plenan pinton de volupto,  
kiel vi trovas en la sem-erupto,  
ne ĝuas ĝis satiĝo post sopiroj...  
Sed kie estas amo, ne tre gravas  
la manko, ĉar trezoron ni ja havas.  
Vin senti tiel varme kaj intime  
en ni, profunde, estas eĉ sufiĉa;  
nur pro l' miraklo tiel plejproksime  
kuŝi, virino estas tre feliĉa...



Sekvas diversaj karesoj kaj plezuroj – priskribataj tute sincere kaj  
malkaŝe. Nur po unu ekzemplo:

En lit' vi bubviziton ne permesis,  
reziĝne flustris: "La monata sang'".  
Sed malkvietis spite mia stang',  
vi ĝin karesis mole. Sed ne ĉesis  
la ŝvelo, kompreneble, eĉ impresis  
jam obeliske. Nun kun brula vang',  
vi proksimiĝis al ĝi kaj per lang'  
kaj lipoj vi ĝin milde ekkaresis.  
Kaj nun eksuĉis vi entuziasme.  
Ho, dolĉturmenta vibro en la nuk'!  
Volupto torda, morda! Dum orgasmo  
en vian buŝon ŝprucis arda suk',  
barakte, ĝeme, senkonscie, spasme  
mi mordis vin je l' alabastra pug'!

En lit' denove, kaj kun sango bola,  
ŝi sentas lin en sia ingo streta;  
dum li esploras ŝin per puŝ' impeta  
ŝi trovas ion. Rida, senparola,  
ŝi premas lin per eta ring' muskola;  
jen, do, kares' interna, pli sekreta  
ol ia ajn alia; per ripeta  
premo ŝi pinĉas lin per ring' petola.  
Ho nova ĝojo, preter ŝajna limo!  
Mirinda interkono kaj intimo!  
Ho senfineco de la amaj artoj!  
Unu alian al kuniĝo logas –  
kiel delice l' plej sekretaj partoj  
interkomprenas, dolĉe dialogas.

Kompari oni povas longe. Jes, viro kaj virino perceptas la mondon  
diverse. Sed krom tio, ĉiu homo havas sian sorton, ne ekzistas tutsamaj homoj kaj  
tutsamaj situacioj. Al la protagonisto de la viraj sonetoj bonŝancis: li edziĝis al sia  
amatino, al ili naskiĝis filo. Sed la virinon la sorto ne kompatis. "Ŝi staras ĉe la

telefon’, senvorta. / Hodiaŭ... en la strato... akcidento... / Li estas morta.” Al ŝi restas nur la memoro. “La lumo estingiĝis sur altaro. / Sed restas lia bildo en animo... (...) Valida estis amo; kaj ŝi restas / inter la feliĉuloj de la mondo.”



Jes, ekde 1932 kaj 1954 la moroj ŝanĝiĝis, tre liberiĝis. Eĉ tro. Kaj la vorton “amo” oni nun ofte uzas malkonvene, ankaŭ kiam reale temas nur pri obseda seksdeziro. Do relegu la admirindajn sonetojn, por trasenti kaj plumemori – kio estas vera amo...

Ho, ne koleru, ke mi vin priversas  
 en la baraktoj de l’ volupta sven’!  
 Ĝi estas sankta don’ kaj sankta pren’,  
 la vera am’ neniam ja perversas.  
 Kaj ĝiaj vojoj kiel ajn diversas,  
 ĝi estas la plej alta tera ben’;  
 se ĝi nin portas en torenta trem’,  
 ja ĉiujn homrezonojn ĝi renversas.

Oni ne devas ami, kvazaŭ terni –  
 ne estas ĝi afero de lascivo  
 kruda kaj besta, aŭ senvola drivo  
 sin simple sur la lito stulte sterni;  
 ne! oni devas ĝin pripensi, lerni,  
 scii pri pli ol simpla pramotivo,  
 por ĝui ĉiun floron de la vivo,  
 por ke amoro povas ja eterni...

*Unue publikigita en: Kataluina esperantisto 374, decembro 2023, pp. 24-26*

**CERBE kaj KORE**

*n-ro 36 (104), januaro 2024*

**Kultura suplemento al la revuo “Ponto” n-ro 138**

“Ponto” estas oficiala informilo de la tutrusia socia organizaĵo “Rusia Esperantista Unio”  
*Oni rajtas uzi kaj represi ĉiujn materialojn de la eldono nur kondiĉe de ĝusta indiko de la fonto*

CkK atendas viajn prozajn, poeziajn, interlingvistikajn, instru-metodikajn kaj sciencopopularajn kontribuojn! Bonvolu sendi ilin al Nikolao Gudskov [nikolao@yandex.ru](mailto:nikolao@yandex.ru).

*Estraro de Rusia Esperantista Unio*

Redaktofino 27.01.2024